PILO-PRESS
Internacia
Informservo

N-ro 44/1974 - 28 dec 1974
Aperas ĉiusemajne

Jara abonkotizo
30,- GM
40,- GM kun
germanlingva END
****************

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (0911) 463649; 514269
Pĉk. Nürnberg
819 56-851

Jarfine...

Ĉi tiu numero estas la lasta de la jaro 1974. Samtempe eliras la 20a eldono de la germanlingva informilo "Esperanto-Nachrichten-Dienst" (END).

Mi dankas al ĉiuj pro la fideleco dum 1974, al tiuj, kiuj abonas kaj legas, kaj al tiuj, kiuj regule liveras informojn kaj kunlaboras.

Al ĉiuj mi deziras feliĉan, prosperan novan jaron 1975!

Ludwig Pickel

***********************

## Zamenhofa Festo en Vieno

Vieno (pp/wm) La 14an de decembro okazis en la Domo de la Junularo (Haus der Jugend) en Vieno, Grünwaldgasse 2-4 en ĉeesto de 150 personoj la ĉi-jara Zamenhofa Festo.

Afergvidanto de Aŭstria Esperantista Federacio, Walter Mudrak, salutis la partoprenantojn, inter ili speciale s-inon Lins, aŭstria samideanino, post kelkdekjara restado en Brazilo, reveninta al Vieno.

Dudeko da Esperanto-gelernantoj el la ĉeflernejo Vieno IV., Schäffergasse, sub modela gvido de sia instruistino, Obersprachlehrerin Gertrud Rothmann, valore kontribuis, prezentante kantojn en Esperanto, i.a. "Donu al mi vian manon, amiko!" kaj du Esperanto-skeĉojn.

Festparolis AEF-prezidanto prof. d-ro Karl Beckmann pri "70 jarojn Esperanto en Aŭstrio", pritraktante ĉefe la unuan, do historian epokon. Elstara pioniro tiam estis ankaŭ prof. d-ro O. Simon, partoprenintо de la 1a UK en Boulogne-sur-Mer, kies filo, d-ro Joseph Simon ĉeestis. Filmojn pri la UK en Hamburgo kaj la SAT-kongreso en Bergamo montris s-ano Finkenzeller, AEF-vicafergvidanto kaj funkciulo de "Monda Turismo".

Emil Vokal, AEF-vicprezidanto, citis la "Esperanto-kalendaron" por la venonta tempo, speciale invitante jam nun al komuna aranĝo kun la "Dana Klubo" en Vieno okaze de la "Semajno de Internacia Amikeco", je la 21 feb 1975 kun filmo pri Kopenhago, la urbo de la 60a UK.

Per komuna kantado de la "Espero" finiĝis la impona aranĝo, kiun inde pliriĉigis profesorino Elisabeth Spiller kaj profesoro d-ro Hans Wawrzik per kvarmana fortepian-ludado. En la pauzo okazis amika interparolado ĉe la bufedo kaj la Librostando de Tramondo.

## Admonaj vortoj en Munkeno

Munkeno (pp) Admonajn vortojn al la pli ol 40 ĉeestantoj de la kunveno okaze de la Zamenhofa Tago en Munkeno direktis la lokaj agantoj, Spirat kaj Weidacher. Ili apelaciis al pli aktiva kunlaboro en la loka kaj regiona agado. Antaŭtagmeze kelkaj bavaraj aktivuloj priparolis la eblecojn pliintensigi la poresperantan laboron en Bavario. La sudbaroj konsentis partopreni kunvenon de bavaraj esperantistoj en Nürnberg dum marto aŭ aprilo 1975.

Esperanto-instruado en Schwabmünchen

Schwabmünchen (pp /gt) La duan jaron jam okazis Esperantokursoj en Gesamtschule Schwabmünchen, urbo najbare al Augsburg. En tri kursoj 45 gelernantoj el la 5a, 6a kaj 7a klasoj lernis la fundamentojn de la Internacia Lingvo, finante la kurson per kursfina ekzamenosub la aŭspicioj de Germana Esperanto-Instituto. En unuhora ceremonieto la kursestro, fakinstruisto Gerald Tucker, transdonis al la sukcesintoj 42 gelernantoj ateston de Germana Esperanto-Instituto, po ekzemplero de la de Libroservo Pickel, Nürnberg, kontribuita legolibro, Niko kaj Nina, kaj al la tri plej sukcesaj el ĉiu lernojaro po ekzemplero de "La bestofarmo kun aŭtogramo de la tradukinto.

Krome, la kursgvidanto transdonis al la ĉeestanta lernejestro, studdirektoro J. Emmer, ekzempleron de Niko kaj Nina por la lerneja biblioteko, kaj de Esperanto Programita por la instruista biblioteko. Studdirektoro Emmer en sia dankparolado gratulis al la gelernintoj, esprimante la deziron ke el la 45 estonte fariĝu 100 gelerantoj.

Menciante ke la jugoslava prezidento Tito ankoraŭ scipovas Esperanton, la lernejestro montris ioman informitecon pri la nuntempa movado.

Ankaŭ por la lernojaro 1974/75 estas antaŭviditaj Esperantokursoj. Krome, pluraj instruistoj montris intereson pri Esperantokurso, almenaŭ kvin el la kolegaro iam jam lernis Esperanton.

Intervjuo kun prof. d-ro Frank

Parizo (pp) En"SAT-Amikaro", n-ro novembro-decembro 1974, aperis intervjuo kun prof. d-ro Helmar Frank okaze de la ekspozicio pri informatiko "Sicob" en Parizo, kie la firmao Navarin S.A. prezentis la instru-aŭtomaton "Robbimat-2-Kybernet.
Jen kelkaj citaĵoj el tiu intervjuo:

Demando: Kial, d-ro Frank, vi uzis Esperanton kaj ne alian lingvon en la aŭdvida aparato?

Respondo: Ĉar montriĝas, ke uzo de tia instru-aparato povus esti konsiderata kiel konkurenca al la multnombraj lingvaj profesoroj. Male, se oni instruus Esperanton en lernejoj, mankus profesoroj kaj tiam nia aparato estus ege bonvena.

Demando: Bonvolu klarigi al ni kiel funkcias via aŭdvida sistemo, kiun ni povas vidi kaj aŭdi en tiu ĉi stando.

Respondo: Tiu ĉi elektonika aparato entenas kernon, kiu povas interkonekti de 1 ĝis 30 respondilojn. Ĝi taŭgas tiel por individuo kiel por kolektivo. La kerno movas kasetmagnetofonon laŭ adaptita ritmo kongrua kun la komprenemo de la lernantoj.
La instruritmo dependas de la uzado de tri projekciiloj kun diapozitivoj. Unu el ili povus esti anstataŭita de filmoprojekciilo. La lernanto povas peti ripetadon kaj respondi jes aŭ ne aŭ elekti inter 4 respondoj. (Tion li faras uzante pupitroklavaron, kiun posedas ĉiu lernanto).
Ĉiu lernanto ricevas, individue, per sia pupitro, respondon. Konektebla respondmontrilo ("Echotest") montras al la profesoro la respondojn de la lernantoj tra lumtabulo. La profesoro povas interrompi la programon komutante la sistemon por rekta instruo. La profesoro povas ankaŭ enŝovi mallongajn programerojn cele al alternita instruado.
La artikolo plume de R. Grandiere finiĝas per jenaj frazoj: "Tiel finiĝis tiu tre interesa vizito de la stando "Navarin S.A.", kie dum tagoj oni projekciis bildojn kaj laŭtparole nomis la objektojn: 'Tio estas tablo', 'Kie estas la kato?'.. Interesa konkludo por la esperantistoj: Kiam sciencistoj interesiĝas pri Esperanto kaj kiam industriistoj investas, tion ili ne faras senpripense. Ili estas pli optimistaj tiurilate ol multaj esperantistoj".

## ILUS-Laborkonferenco en Budapeŝto

Budapeŝto/Paderborn. (pp) La laborgrupo "Interlingvistiko kaj Lingvokibernetiko" en la Internacia Asocio pri Programita Instruado okazigos sian 4-an Laborkonferencon vendredon, 1975-01-03, de 10 - 16 h, en la gimnazio "Margit Kaffka", Budapeŝto, Villányi ut. 5 kunlabore kun Hungara Esperanto-Asocio. Partoprenos ĝin i.a. Prof. d-ro H. Frank, Hermann Behrmann, Prof. d-ro Iŝtván Szerdahelyi, inĝ. Antal Münnich.
Laborlingvoj estos la hungara, kiel la lingvo de la gastiganta lando, kaj Esperanto.

## Kultura programo de E-Klubo

Aachen. (pp) La Esperanto-Klubo Aachen eldonis programfolion pri siaj kunvenoj januaro - junio 1975 sub la titolo "Invito al nia Kulturprogramo".
La kunvenoj okazas ĵaŭde, ekde la 19,30 horo, en Aachen-Burtscheid, Jugendheim "Kalverbenden".
Por januaro estas anoncita jena programo:

9.1.75 A. Prelego: "Mongolio, lando de kontrastoj" de s-ro Keller
B. Lingvaj demandoj: Geografiaj terminoj en la Internacia Lingvo
C. Novaĵoj el la Esperanto-gazetaro: "Sennaciulo"

La korespondadresoj de la klubo estas: Paul Firmenich, D-519 Stolberg, Jahnstr. 5 aŭ A. Uebags, D-51 Aachen, Karl-Marx-Allee 172 (Tel. 65568)

## Afero certe observenda

Lieĝo (pp) D-ro Pol Denoël, prezidanto de la Eŭropa Esperanto-Centro, ricevis leteron de prof. H. Janne, datita la 15an de novembro 1974, en kiu tiu sciigas la ricevon de reagoj de esperantistaj rondoj al la lingva demando tuŝita en lia raporto pri la instrupolitiko en la Eŭropaj Komunaĵoj.

Li informis ke "li skrupule komunikis al la kompetentaj servoj de la Komunaĵoj ĉiujn leterojn (kaj dokumentojn), senditajn al li kaj nome tiujn de esperantistaj grupiĝoj".

Li aldonas: "Estas afero certe observenda de la interesiĝantaj rondoj, ĉar ĝi estas grava".

## A. Masuhr en Aŭstralio

Adalbert Masuhr, pri kies vojaĝo ni jam kelkfoje raportis, nuntempe estas en Aŭstralio. En Perth li vizitis kelkajn esperantistojn, "kiuj ja bone parolis Esperanton, ĉar ili mem vojaĝis multe."

## Esperanto en la radio

Romo. La pasintdimanĉa elsendo de Radio Roma estis surprize bone kaj klare aŭdebla, sur ondo 41 m. S-ro Conrad el Munkeno konstatis la saman bonan aŭdeblecon sur ondo 49 m. Oni povis aŭdi leterkeston.
Varsovio. Okaze de la kristnaskaj festotagoj oni povis aŭdi diversajn porokazajn felietonojn, ekz. pri Zakopane, pri pola muzikisto, pri la "Vintro en la Esperanto-literaturo" (Tio estis ripetaĵo el la Varsovia arkivo), pri la praktika utiligo de Esperanto dum la lastaj tridek jaroj en Pollando. Bedaŭrinde la aŭdebleco ne ĉiam estis kontentiga, pro tio ne eblis surbendigo de unu aŭ alia vere interesa programo. La leterkesto de 26/27 dec, fakte la lasta en la jaro 1974, estis en bona ekvilibro: estis cititaj leteroj el diversaj landoj orientaj kaj okcidentaj. Krome oni aŭdis intervjuon kun finna aŭskultanto, la Varsovia "kolono" en Finnlando.

## SCIENCA LITERATURO EN ESPERANTO

**La scienca literaturo en Esperanto sendube ne jam estas ampleksa. La apero de tiuj malmultaj verkoj ne baziĝas sur certa plano, sed pli aŭ malpli al hazardo ŝuldiĝas.**

**En 1967 aperis volumo sub la titolo „La mondpercepto de la modernaj natursciencoj" kiel rezulto de prelegoj en la kadro de la Internaciaj Seminarioj de Germana Esperanto-Junularo. Estis intencite eldoni serion da verkoj, sed ne aperis pli ol unu volumo, de kiu bedaŭrinde ĝis hodiaŭ nur vendiĝis kelkaj centoj da ekzempleroj malgraŭ la bona ekstera aspekto kaj interesa faka enhavo. (Pri la enhavo de tiu libro legu sur alia loko!)**

Kaj ĝuste nun tiu libro fariĝas denove tre aktuala, post kiam sur la Esperanto-scenejo pli kaj pli aperas sciencistoj, el kiuj elstaras prof. d-ro Helmar Frank, direktoro de la instituto por kibernetiko, Paderborn, kaj profesoro pri kibernetika pedagogiko. Li estas aŭtoro de multaj fakaj verkoj pri tiu nova scienca branĉo. Speciale gravas la germanlingva fontokolekto (Quellensammlung), pri kiu Libroservo Ludwig Pickel eldonis apartan germanlingvan prospekton, kiu estas senpage havebla.

Estas prof. d-ro Helmar Frank, kies verkoj resp. difinoj pri „cibernetiko" estas citataj en la libro „La mondpercepto de modernaj natursciencoj" en la ampleksa kontribuaĵo „Cibernetiko" de Klaus Wandelt. Tiu kontribuaĵo ampleksas 57 paĝojn, sed pli interesa tiu fakto fariĝas pro tio, ke la tradukinto de la kontribuaĵo estas Hermann Behrmann, ne nur konata kiel verkinto de „Esperanto programita", sed kiel nuna kunlaboranto de prof. Frank. Ĉu estis hazardo aŭ destino!?

Ĉiukaze dank' al Hermann Behrmann pro lia agado en 1966 Esperanto hodiaŭ disponas pri presita enkonduko en la bazajn difinojn de la kibernetika scienco. Kaj ĉiu, kiu interesiĝas pri tiu scienco aŭ volas sekvi la agadon de la ILUS-grupo en Paderborn, nepre aĉetu tiun bazan verkon en la kadro de la libro „La mondpercepto de la modernaj natursciencoj". Feliĉe restis ankoraŭ granda stoko por kontentigi ĉiun bezonon!

En parto I „Difinoj de cibernetiko" oni povas legi:

„Tre ĝeneralaj estas la difinoj troveblaj ĉe K. Steinbuch:

‚... Sub cibernetiko estas komprenata la scienco pri la informstrukturoj en la teknika kaj eksterteknika kampoj.' Tiu ĉi informaspekto atentiganta la cibernetikan esplormetodon (vd. p. 114) forte sentiĝas en la sekvantaj difinoj. Ekzemple **H. Frank** difinas:

‚Cibernetiko estas la teorio (kaj praktiko) pri la kapto, prilaboro kaj spaca-tempa komunikado de informoj.'...

Cibernetiko estas laŭ **H. Frank:** ‚... la scienco pri komunaj strukturoj kaj ties matematikigo kaj realigo.' "

Aliloke ni legas: „En parto III B ni iom traktis la karakteron de la informteorio... Laŭ **H. Frank** ni konceptas la rezultojn de tiuj laboroj sub la nomo informpsikologio."

Estas la senco de ĉi tiu informo prezenti kelkajn sciencajn literaturaĵojn kaj instigi la legantojn al mendo. Speciale ni atentigas ankaŭ pri la eldonaĵoj de la Someraj Universitataj Kursoj, kiuj traktas kelkajn sciencajn kampojn. Per aĉeto de tiuj eldonaĵoj la aĉetanto subtenas la novan rekomendindan iniciaton el Lieĝo.

**Socilingvistiko**

**Lingvoj, gentoj kaj lingva politiko** de M. Duc Goninaz
SUK 1974, 38 paĝoj, DIN A 4
**Enhavo:** Enkonduko — Lingvo kaj socio — La linvopolitiko de la eŭroptipaj landoj — Kelkaj ekzemploj: Francio, Hispanio, Sovetunio — La lingva politiko de la evolulandoj kaj novkreitaj ŝtatoj — La interŝtata situacio — Al solvo? — Individuo kaj lingvaj komunaĵoj — Bibliografio
**Prezo 12,80 DM**

**Medicino**

**Anatomno de la homa korpo**
de T. Nakayama
SUK 1972, 52 paĝoj, DIN A 4
**Enhavo:** Enkonduko — La skeleta sistemo — La muskola sistemo — La sistemo de la spirado — La sistemo de la digestado — La sistemo de la urinado — La sistemo de la generado — La sistemo de la cirkulado — La endokrina sistemo — La sistemo de la Sentado — La nerva sistemo — Epilogo: organisno kaj ĝia medio
**Prezo 18,— DM**

**Kemio**

**Informado kaj dokumentado pri kemio**
de S. Kawamura
SUK 1974, 45 paĝoj, DIN A 4
**Enhavo:** Antaŭparolo — Kemia esplorado kaj literaturo — Primara literaturo — Originalaj raportoj — Sekundara literaturo — Resumoj kaj revuoj — Terciara literaturo — Indeksoj — Klasigo kaj aranĝo de informoj — Lingva problemo — Bibliografio (6 figuroj + 14 tabeloj)
**Prezo 15,80 DM**

**Kemio de manĝaĵoj, ĉefe novaj proteinoj** de S. Kawamura
SUK 1974, 94 paĝoj, DIN A 4
**Enhavo:** Antaŭparolo — Enkonduko — Ĝisnunaj animalaj manĝaĵoj — Ĝisnunaj plantaj manĝaĵoj kiel proteinfontoj — Novaj manĝaĵoj — Artefarita viando el sojo — Gistoj el petrolo kaj petroldevenaj kombinaĵoj — Bibliografio — Aŭtorindekso (7 figuroj + 44 tabeloj)
**Prezo 24,80 DM**

**Kemio kaj biokemio de karbonhidratoj**
de S. Kawamura
SUK 1974, 47 paĝoj, DIN A 4
**Enhavo:** Antaŭparolo — Kemio de monosakaridoj — Kemio de oligosakaridoj. Kemio de polisakaridoj — Fotosintezo kaj pentozfosfata ciklo — Glikolizo — Aerobia katabolo de piruvato — Bibliografio — Alfabeta indekso (14 figuroj + 6 tabeloj)
**Prezo 15,80 DM**

**Porfirinoj** de M. Flint
SUK 1974, 79 paĝoj, DIN A 4
**Enhavo:** Biokemio de vivnecesaj pigmentoj, ĉefe tiu de la ruĝa ĉelo de la sango — Kemia strukturo — Fizikaj kvalitoj — Kompleksoj biologie gravaj — Biosintezo de hemo — Hema sintezo — Regulado de la sintezo de hemo — Malfunkcioj de tetrapirola produkto ĉe la homo — Normala metabolo kaj funkcioj de porfirinoj-Katabolo de hemoglobio — Malfunkcioj de galpigmenta metabolo — Kompleksoj magnezio-porfirinaj — Bibliografio
Prezo 21,80 DM

**Mendu ĉe**
Ludwig Pickel, 85 Nürnberg 1,
Postfach 2113
Libroservo, PSchK Nürnberg 819 56-851

**Enkonduko en organikan kaj biologian kemion** de S. Kawamura
SUK 1974, 89 paĝoj, DIN A 4
**Enhavo:** Antaŭparolo — Organika kemio — Hidrokarbidoj — Heterocaklaj kombinaĵoj — Funkciaj grupoj — Biologia kemio — Kompcnaĵoj de organismoj — Lipidoj — Proteinoj — Nukleataj acidoj — Enzimoj — Bibliografio — Alfabeta indekso (31 figuroj + 16 tabeloj)
**Prezo 24,— DM**

**Fundamentaj konceptoj en kemio**
de S. Kawamura
SUK 1974, 79 paĝoj, DIN A 4
**Enhavo:** Antaŭparolo — Apartigo de puraj substancoj el miksaĵo — Substanco kiel molekuloj — Pri elementoj konsistigantaj molekulojn — Pri atemoj kaj ilia strukturo — Formado de molekuloj el konsistigantaj atomoj — kemia ligo — Kemiaj reakcioj — Bibliografio — Alfabeta indekso (12 figuroj + 21 tabeloj)
**Prezo 21,80 DM**

**Biologio**

**Planktono kaj mara produktado**
de E. Balech
SUK 1974, 88 paĝoj, DIN A 4
**Enhavo:** Antaŭparolo — Ĝeneralaĵoj pri planktono — Fotosintezo de la fitoplanktono — Produkteco kaj produktado — Rilatoj fitozooplanktono — Vertikala distribuado de la planktono — La homo kaj la planktono — La planktono kiel oceonografa indikatoro — Pri la kapabloj de la maroj subteni la homaron — Bibliografio — Speciala terminaro (8 figuroj)
**Prezo 24,— DM**

**Elementa ekologio** de C. Støp-Bowitz
SUK 1974, 96 paĝoj, DIN A 4
**Enhavo:** Antaŭparolo — Bazaj nocioj. La ekosistemo — Fluo de energio kaj materio en la ekosistemo — Faktoroj limigantaj la produktadon — Ekvilibro kaj strukturo en ekosistemoj — Populacia ekologio. Sukcesioj — Mara kaj nesalakva ekologio — Tera ekologio — Protektado de naturo kaj medio — Bibliografio (12 figuroj)
**Prezo 24,80 DM**

**Enkonduko en ĝeneralan biologion**
de C. Støp-Bowitz
SUK 1974, 93 paĝoj, DIN A 4
**Enhavo:** Antaŭparolo — La ĉelo — Ĉeldivido — Reproduktiĝo I — Reproduktiĝo II — Evoluo de la individuo — Sistematiko. Nomenklaturo — La evoluo de la homo I — La evoluo de la homo II — Bibliografio (17 figuroj)
**Prezo 24,80 DM**

**Segmentumitaj animalaj grupoj**
de C. Støp-Bowitz
SUK 1974, 88 paĝoj, DIN A 4
**Enhavo:** Antaŭparolo — Segmentumo aŭ metamerismo — Anelidoj — Artikuloj — Trilobulformaj animaloj — Ĥeliceruloj — Krustuloj — Miriapodoj kaj insektoj — Kelkaj enigmaj grupoj — Ĥorduloj — Bibliografio (32 figuroj)
**Prezo 24,— DM**

* * *

**La mondpercepto de la modernaj natursciencoj** kompilis Hermann Behrmann, Eldonejo Ludwig Pickel, Nürnberg 1967
170 paĝoj, 13,5 x 21 cm, broŝ.
**Enhavo:** B. Popovic, Rigardo en la Mikro- kaj Makrokosmon; Vasil Peevski, Natursciencaj fundamentoj pri Kosmonaŭtiko kaj Pac-cela utiligo de Satelitoj; Ivo Lapenna, Internacijuraj problemoj de Spacveturado; Adam Gula, Elementaj korpuskloj kaj la strukturo de la Materio; Wim de Smet, Nunaj mondperceptoj per la biologio; A. Albault, Superpopulado, Konsekvenco de kronika malsato; Erkki Kääriäinen, Pri la postsekvoj de la Gracia Epoko en Fenoskanio; Klaus Wandelt, Cibernetiko, k. a.
**Prezo 9,60 DM**